

Esperanto tra la Mondo



ESPERANTISTA SOMERA VIVO

Budapeŝto. — 51-a Universala Kongreso de Esperanto kun pli ol 4000 partoprenantoj el 42 landoj. La alta protektanto de la kongreso, S-ro Kishazi, vic-prezidanto de la hungara respubliko, mem ĉeestis la inaŭguron.

Okazis ĝeneralaj kaj fakaj Kunvenoj, arta festivalo somera universitato, belartaj konkursoj, infana kongresejo, ekskursoj. La ĉefaj laboraj temoj rilatis al la rezultoj de la Jaro de Internacia Kunlaboro, la instruado de Esperanto en lernejoj, kaj la pliintensigo de agado en fakaj medioj.

La estraro de U.E.A. decidis, krom la altigo de la kotizoj, la reorganizon de la konsulta komisiono pri lernejoj, la ĉesigon de la apero de « Monda Kulturo » kaj la eldonadon de « Gepatra Bulteno ».

En Tel Aviv (2-9 de aŭgusto 1967) la laborsekcioj estos : « Esperanto en fakoj kaj profesioj », « lerneja kaj eksterlerneja instruado de la internacia lingvo », « Esperanto por Turismo ».

Swanwick. — Partoprenis 310 membroj de SAT, el 14 landoj. Okazis la kutimaj laborkunsidoj, prelegoj, Forumo (kiu pritraktis la Humanistan movadon en diversaj landoj), ekskursoj. La partoprenantoj estis akceptitaj de la urbestroj de Nottingham kaj Stoke on Trent. La venonta SAT Kongreso okazos en Malmö (Svedio).

Pecs. — Proksimume 1000 gejunuloj el 24 landoj. « Neŭtraleco » estis la temo, kiun oni speciale diskutis. Aliĝis al TEJO Argentino, kaj Novzelando.

Graz. — 144 edukistoj kun 60 lernantoj ĉeestis la pedagogian seminarion.

Gresillon. — Pli ol 400 gesamideanoj vizitis la Kulturdomon el kiuj eksterlandanoj el 14 landoj. Raporto aperas aliloke en tiu ĉi numero.

NOVAĴOJ EL...

Hindio. — La hinda duon-kontinento pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. En decembro 1966 okazos la unua Tutlanda Kongreso. Libro aperis aŭ baldaŭ aperos. Ekspozicio estis prezentita en Santiniketan. Alia estos baldaŭ prezentita en New Delhi. Sed la Hinda Esperanto-Instituto bezonas materialan helpon. Adreso : S-ro Seoti Prakash, 13-15/10 Ramesh Nagar, New Delhi 15.

Ĉinio. — Fremdlingva Eldonejo, Pekino, aperigis trian ilustritan kajeron en Esperanto pri la milito en Vjetnamio.

Radio-Pekino daŭre elsendas vendrede kaj sabate vespere en Esperanto per pluraj mallongondaj stacioj.

Eldonaĵoj. — En la serio « Oriento-Okcidento » ĵus aperis numeroj 5 kaj 7 nome « Martin Fierro » (argentina gaŭĉa epopeo de José Hernandez) kaj « Kvin virinoj de amo » de Ihara Saikaku, japana verkisto.

La jubilea libro de Kalocsay kaj Baghy : « Ora duopo » estis laŭdire jam elvendita dum la kongreso.

Aperis (Scienca Revuo), « La briofitoj el la bieno

Gresillon » de Feodor Jelenc profesoro pri natursciencoj. Okaze de multaj restadoj li havis la okazon bone koni tiun aspekton de la Gresillon-a mondo.

U.E.A. eldonis « La Esperanto-Societo », kun konsiloj por ĉiuj grupaktivuloj. Prezo : 1,50 gld. (6 st.).

Ĵus aperis « Fervoja Terminareto », Germana-Esperanta, Esperanta-Germana. Adreso : E. Ritterspach, Berliner Allee 1,D-607 Langen, Germanio.

Dua numero de I.O.E.-gazeto, organo de Instituto por Oficialigo de Esperanto, aperis. Redaktoro : A. Sekelj, Kondila 24, Beograd, Jugoslavio.

Estis eldonita en Nederlando disketo kun du muzikaj komponaĵoj kun esperantaj titoloj : « Esperanto marŝo » kaj « Sub la verda standardo », luditaj de la Reĝa Nederlanda Milita Orkestro.

Propono al Unuiĝintaj Nacioj. — Ĝin fine subskribis 912 463 individuaj personoj kaj 3 832 organizaĵoj kun 70 329 000 membroj.

Esperanto, ponto-lingvo. — En Praha aperis du malnovaj islandaj sageoj, tradukitaj de la islanda lingvo al la esperanta de B. Ragnarsson kaj de la esperanta al la ĉeĥa de O. Knichal.

En Japanujo ĵus aperis la vjetnama romano « Franjo Tu Haŭ » tradukita el la esperanta eldono.

Plej aĉetataj libroj. — La « Dia Komedio » de Dante kaj « Hamleto » de Shakespeare estis la plej aĉetataj fikciaj verkoj en Esperanto dum la jaro 1965.

Grava ekspozicio. — Ĝis la 29-a de oktobro ekspozicio pri Esperanto estas prezentata en la Franca Nacia Pedagogia Instituto sub patronado de la Ministro por Nacia Edukado, de la Rektoro de la Pariza Akademio kaj de aliaj eminentuloj.

Junaj francoj, kiuj dezirus gastigi junajn ĉeĥojn kaj esti gastigitaj de ili poste, bonvolu skribi al : Dominique Babin, 13, Bd de la Chauvinière, 44 - Nantes.

Francan famekonatan brandon KONJAKO disvendas s-ano DESPEYROUX, reprezentanto, 200, rue du Faubourg St-Denis, Paris-10°. Altkvalito garantiata. Ekspedo ekde la produkto en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu !